*******************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2010/1 (aprilo 2010)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

*********************************************************************************

Jen kelkaj gravaj aferoj el la lastaj monatoj:

1. LERNEJA INSTRUADO

Ni ofte emfazas, kiom grave estas oferti Esperanto-kursojn en la kadro de lerneja instruado, montri nin, nian lingvon tie, eluzante la pedagogiajn valorojn, la rapidan lerneblon de la internacia, neŭtrala lingva kominikilo. Dankon al la gekolegoj, kiuj prizorgas tian instruadon.
Estas ĝojige, ke ankaŭ en 2010 estas 10-15 lernejoj, kiuj en iu formo instruas Esperanton.
Mi petas la gekolegojn: bv. raporti pri viaj kursoj, atingaĵoj ĉe instru-german@googlegroups.com, ja via laboro povas esti modelo por aliaj, povas plifortigi la ĝeneralan akcepton, pozitivan prijuĝon de la lingvo.
Bv. ne forgesi registri novajn grupojn kaj ŝanĝojn ĉe malnovaj ĉe http://edukado.net

Retlisto pri lerneja agado, instruado: membriĝu kaj sendu informojn al la dissendolisto: esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com

Unu el la plej sukcesaj agadoj estas la 2-jara Comenius-projekto (2008-2010) por bazlernejanoj subvenciata de EU, en kiu partoprenis Nicolai bazlernejo en Herzberg am Harz, Springboard-lernejo en Bar Hill (Britio) kaj bazlernejo en Miskolc (Hungario). La projekto baziĝas sur la lernfaciliga rolo de Esperanto en la fremdlingva instruado kaj rezultis firmiĝantajn amikecojn inter la gelernantoj, gepatroj kaj instruistoj.

2. UNIVERSITATOJ

Estas sekvenda ekzemplo la E-instruado cxe universitatoj. Ni gratulas al cxiuj instruistoj, kiuj sukcesis lancxi kursojn en tiu nivelo. Nun ekzistas en 5 lokoj.
Aparte mi mencias, ke D-ro Rudolf Fischer ne nur ellaboris taŭgan lernmaterialon 'Esperanto en dialogo' (vidu ĉe http://esperanto.de/lehrbuch/index.html, sed ankaŭ ekzamenas siajn lernantojn laŭ la niveloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro.

3. INSTRUKAPABLIGO, KLERIGMODULOJ

Germana Esperanto-Centro /Interkultura Centro Herzberg (GEC/ICH), Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo kun AGEI, landa sekcio de ILEI ankaŭ en 2010 anoncis studsesiojn por lernemuloj kaj por kvalifiki Esperanto-kursgvidantojn, instruantojn.
La trejnado okazas en modula sistemo, plenumebla en 1-2 jaroj.
Esperanto-gramatiko, kulturo, literaturo kaj metodiko estis la kvar elekteblaj klerigmoduloj dum Printempa Semajno Internacia en St. Andreasberg komence de aprilo. Dekoj de interesiĝantoj elektis la specialan fakan trejnadon gvidatan de Peter Zilvar, Christof Krick kaj Zsófia Kóródy.

Jen la sekvaj datoj:
- 30.04.-02.05: 45a Studsesio: GEJ/AGEI-Klerigsemajnfino pri varbado kaj kursorganizado en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Trejnontoj: Peter Zilvar, Zsofia Korody. Kiel invitita prelegonto, Felix Zesch prezentos sian kompilaĵon: Kiel organizi kurson
- 21.-24.05: 87. DEB-Kongress - 87-a GEK en Kaiserslautern ebla oferto, prezentado de Klerigmoduloj: gramatiko, literaturo, kulturo, metodiko

- 11.-17.07: Internacia OSIEK-Konferenco en Herzberg
47a Studsesio: Klerigmoduloj pri literaturo, kulturo, interlingvistiko, metodiko
- 8.-12.10: TORPEDO-6 / ILEI-Seminario pri projektoj kaj subvencipetado.
Spertinterŝanĝo, praktika trejnsesio pri projektoj, raportoj pri sukcese subvenciataj programoj. La detalan programon vi povos vidi ĉe http://esperanto-urbo.de (al ne-retuzantoj ni sendos per poŝto laŭ peto.)
48a Studsesio: Klerigmoduloj pri organizado, movadaj konoj, metodiko
KER-ekzamenoj B1-B2-C1 niveloj
- 10-12.12: 49a Studsesio: Klerigmoduloj pri historio, literaturo, interlingvistiko

Ĉiuj partoprenantoj ricevas atestilon, kiu ebligas kolektadon de kreditpoentoj. Detaloj pri la studsemajnfinoj, klerigofertoj estas legeblaj ankaŭ ĉe http://ic-herzberg.de kaj http://esperanto.de/agei

4. FAKAJ OFERTOJ DE GEC/ICH

Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg krom la klerigsesioj ofertas ankaŭ aliajn programerojn dum la tuta jaro. Aldone ni sendas la detalan Programkalendaron por 2010. Bonvenon al

- lingvokursoj (de komencantoj ĝis perfektigo)
- klerigsesioj
- fakseminarioj
- kunsidoj, konferencoj, ktp.

Ni rekomendas ankaŭ la uzadon de la biblioteko de ICH, kiu estas atingebla dum la tuta jaro en la Esperanto-Domo en Herzberg kaj estas je dispono eĉ kun faka konsilado, prunto-servo.
NOVA: pedagogia-metodika fakkolektaĵo fariĝis aparta sekcio de la biblioteko kun multaj lernolibroj, lingvistikaj kaj metodikaj verkoj, vortaroj, gramatiklibroj, instrufilmoj, instruhelpiloj.

Kelkaj lernolibroj, faklibroj, vortaroj, ktp. estas haveblaj, mendeblaj ankaŭ de ICH-libroservo por kursanoj, gekolegoj.
Jen kelkaj ekzemploj: Poŝamiko, serio de trilingvaj Etvortaroj de Ilona Koutny, Tendaraj Tagoj kaj Nemave edifi de Stefan MacGill, Manlibro pri instruado, ktp.

Juna amiko: ICH kolektas ankaŭ abonojn al Juna amiko, la riĉenhava gazeto por lernemuloj, komencantoj. Tri dikaj numeroj, 3x52 paĝoj/jaro, por nur 14 EUR. Bv. aboni por vi mem aŭ/kaj por viaj kursanoj. Skribu al zsofia.korody@esperanto.de

5. LINGVOEKZAMENOJ

En Germanio okazis la unua sesio de la novtipaj lingvoekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) en Düsseldorf, dum IF 2008/2009. La KER-ekzamenoj de UEA/ITK fariĝis popularaj, dum 2009 19 personoj el Germanio partoprenis ilin kaj akiris valoran atestilon pri siaj lingvaj konoj. Ankaŭ dum IF 2009/2010 en Nördlingen okazis sukcesa sesio.
Dum PSI en St. Andreasberg en aprilo 2010 12 kandidatoj trapasis la internaciajn KER-ekzamenojn en niveloj B1, B2 kaj C1. Inter ili 6 personoj estis el Germanio. Gratulojn al ĉiuj!

La sekva ekzamensesio en Germanio estos ofertata inter 8-10 oktobro dum la pedagogiaj tagoj TORPEDo-6 en Herzberg am Harz.

ALVOKO: ni rekomendas la novajn KER-ekzamenojn al ĉiuj Esperanto-instruistoj, instruantoj, kursgvidantoj, funkciuloj de GEA, LA-oj, reperzentantoj de asocioj, kluboj. Per ekzameniĝo oni povas akiri proprajn spertojn, ekkoni la nivelojn, postulojn, kaj poste oni povas mem konsili al aliaj, helpi ekzameniĝontojn.
Vian aliĝon al KER-ekzamenoj bv. frue anonci al Zsofia Korody zsofia.korody@esperanto.de

Dum grandaj internaciaj renkontiĝoj, UK, ktp., ankaŭ la malnovaj UEA/ILEI ekzamenoj estas ofertataj, se estas sufiĉa nombro de kandidatoj.

OFERTO: la testlibro 'Esperanto de nivelo al nivelo', kiu enhavas po 2 seriojn en B1, B2 kaj C1 niveloj kaj estas bonega helpilo por prepariĝo al la KER-ekzamenoj, estas aĉetebla por 10,50 EUR ĉe Interkultura Centro Herzberg aŭ estas mendebla de Zsofia Korody

## 6. KONFERENCOJ 2010 kaj 2011

La ILEI-konferenco en 2010 okazos en Matanzas, Kubo, inter 11-17 julio. Ĝia ĉeftemo: Edukado por kultura proksimiĝo
Detaloj, aliĝilo estas troveblaj ĉe http://ilei.info/agado/konferencoj.php

La ILEI-konferenco en 2011 estos organizata en Kopenhago, Danio.

## 7. INFORMADO

La ĉefaj informkanaloj por AGEI estas IPR, kiun aŭtomate ricevas ĉiu membro. Ankaŭ la gazeto Esperanto aktuell estas je dispono por instru-rilataj novaĵoj, raportoj. Freŝajn informojn vi povas sendi kaj ricevi ankaŭ per la retlisto instru-german@googlegroups.com.
Krom bazaj asociaj informoj alvokoj, aktualaĵoj aperadas ankaŭ ĉe http://esperanto.de/agei, sub Alvokoj.
Fakajn artikolojn, kontribuaĵojn, raportojn, ktp. vi povas sendi rekte al la redaktoroj de IPR kaj Esperanto aktuell.
Al retuzantoj ni rekomendas ankaŭ la regulan rigardon de la paĝaro de http://edukado.net kaj http://ilei.info

## 8. AGEI-MEMBROJ

La membronombro (laŭ la stato en marto 2010) estas 84. AGEI estas la plej multnombra landa sekcio de ILEI.
Ni dankas al ĉiuj, kiuj jam pagis siajn jarkotizojn kaj petas la forgesemulojn rekotizi por 2010.
La membreco kostas EUR 25,- jare. Familianoj ricevas rabaton.
La kotizon (kiu enhavas la abonon de Internacia Pedagogia Revuo IPR) bonvolu sendi al la konto de AGEI: Numero 5187110500 Volksbank Schmallenberg, BLZ 46062817

Por novaj membroj aliĝilo troviĝas ĉe la AGEI-retpaĝo http://esperanto.de/agei sub menupunkto Aliĝo. Viajn demandojn pri membriĝo, kotizado bv. sendi al nia kasisto: Christoph Krick, Günninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, christof.krick@esperanto.de

9. AGEI JARĈEFKUNVENO 2010 – INVITO

Jarĉefkunveno de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) okazos dum la 87a Germana Esperanto-Kongreso GEK (21-24.05.2010) en Kaiserslautern, Rejnland-Palatinato

DATO: 22.05.2010 16:00-17:30
LOKO: Edith-Stein-Haus, Engelgasse 1, 67657 Kaiserslautern, Germanio.

Aliĝi al la kongreso eblas per http://esperanto.de/gea/DEK2010.html
aŭ skribu al Dirk Werner Hartmann (LKK), Sprach- und Wirtschaftschule Rahn, Karl-Marx-Str. 37, 67657 Kaiserslautern gek2010@esperanto.de

Jen invitilo por nia membraro:

Sehr geehrte Mitglieder,

hiermit lade ich statutengemäß zur Mitgliederversammlung am 22.05.2010 (Samstag) 16:00 in 67657 Kaiserslautern, Rheinland-Pfalz. Ort der Versammlung: Edith-Stein-Haus, Engelgasse 1 ein.

Vorgesehene Tagesordnung:
TOP 1: Wahl des Sitzungsleiters. Begrüßung und Eröffnung. Wahl des Protokollanten. Feststellen der ordnungsgemäßen Einladung und Beschlussfähigkeit.
TOP 2: Feststellen der Tagesordnung.
TOP 3: Kassenbericht. Bericht der Rechnungsprüfer.
TOP 4: Bericht des Vorstands. Entlastung des Vorstands.
TOP 5: Wahl des Vorstands
TOP 6: Sonstige Aktivitäten und Anträge, soweit bis zur Sitzung eingereicht
TOP 7: Arbeitsplan für das neue Vereinsjahr. Ort und Zeit der nächsten Mitgliederversammlung
TOP 8: Verschiedenes

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erhofft sich daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

Dezirante al vi sukcesan instrulaboron, aktivan agadon, esperante je rezultodona jarĉefkunsido, harmonia kunlaboro,
kore salutas

Zsofia Korody
prezidanto de AGEI

Ps. Aldone mi sendas al vi invitilon al la sekvas studsesio (30.04.-02.05) kaj la alvokon kun bazaj informoj pri la grava kunveno organizota kun ILEI en oktobro: TORPEDo-6.